

LA LUMILO

Numero 1 - dimanĉo 20-a julio 1997

Kontribuaĵoj petataj

La redakcio de La Lumilo invitas kongresanojn kontribui artikolojn aŭ, prefere, artikoletojn. Tiuj povas temi pri incidentoj okazintaj dum la kongreso, pri aferoj jam traktitaj en la tagbulteno, aŭ pri aliaj temoj interesaj al Esperantistoj. Ĉu oni povos aperigi ilin, tio dependos de la disponebla spaco kaj kompreneble la decido de la redaktoro estos finofara. La kongresa kuriero estas redaktita posttagmeze/vespere kaj la limhoru por la materialo por sekva matena numero estas la 16:00 ĉiuvespere. (La kuriero ne aperos merkredon.) Lasu vian materialon ĉe la informejo. Dankon!

Por pli aĝaj junuloj

“EK” - la junula esperantista grupo en Aŭstralio - invitas la pliaĝajn junulojn (almenaŭ 18-jaraĝaj) iri kun ili por festi en noktoklubo kaj drinkejoj. Ni rendezuos ĉiun vesperon dum la kongreso je la 18a horo, ĉe Grosvenor Hotel, 125 North Terrace, preskaŭ rekte trans la straton de la kongresejo. Bonvolu noti, ke laŭleĝe estas malpermesite al homoj pli junaj ol 18 jarojn eniri drinkejon, pro kio nepre kunprenu taŭgan identigilon. Ankaŭ ne portu tolŝuojn. Por informiĝi pri aliaj distraĵoj kaj simile, ĉeestu la kunvenon en ĉambro Li Hajpin, dimanĉon la 20an de 14h30 ĝis 15h15.

Cseh-metodo

Cseh-Kurso kaj Cseh-Seminario estas aranĝoj aparte pagendaj. Ĉiu, kiu deziras partopreni, bonvolu pagi ĉe la enirpordo al salono Linton. Tiuj, kiuj jam aliĝis, nepre ĉiutage havu kun si la kvitancon, por rajti eniri la salonon. Se iuj interesatoj deziras nur observi la funkciadon de la metodo, tiuj rajtas ĉeesti kontraŭ pago de AU\$ 15,00 por unu leciono. Ili povas pagi siajn biletojn ĉe la enirpordo. La organizantoj petas ilin resti en la salono de la komenco de la leciono ĝis ĝia fino.

Ĉu biskviti?

Vi trovis en la kongressaketo biskvitojn, baktajn de kampaninoj el Wilmington (400 enloĝantoj). Wilmington situas oriente de la bela montaro Flinders, 300 kilometrojn norde de Adelajdo. La Wilmington-aninoj provizas manĝaĵojn al la regiono. Per la profito ili subtenas la lokan maljunulejon.

Prelego de David Crystal

David Crystal, profesoro pri lingvistiko en la universitato Kimra, faros publikan prelegon en la angla lingvo pri la temo: *Global English - Can other languages survive? [Tutmonda angla - Ĉu aliaj lingvoj povos postvivi?]*. ĝi okazos mardon, je la 18h00 en la Council Room, 7-a etaĝo, Hughes Building, Hughes Plaza, University of Adelaide. Refreŝigaĵoj ekde la 17h30. Kongresanoj anglo-parolantaj estas bonvenaj en la publiko.

Redaktofino...

Estas pli da informo pri Adelajdo ĉe nia TTT-a retadreso <http://www.esperanto.org.au>

Faktoj pri Adelajdo

Ĉe la komenco de la nuna jarcento la adelajdanoj estis proksimume 250,000. Kiam komenciĝis la unua mondmilito, la loĝantaro jam kreskis ĝis 400,000, kaj je la komenco de la dua mondmilito la nombro estis 600,000. Hodiaŭ estas 1,200,000 adelajdanoj.

Adelajdo estas la komerca kaj industria centro de Sudaŭstralio. Inter la ĉefaj industrioj troviĝas grandaj aŭtofabrikoj, kiujn multaj aliaj industrioj provizas per partoj. Situas ankaŭ ĉi tie unu el la plej grandaj fabrikejoj de optikaĵoj en la mondo. Krome troviĝas fabrikistoj de kemiaĵoj, drogoj kaj narkotikaĵoj, domaparatoj, agrikultura maŝinaro kaj submaraj ŝipoj. Estas reserĉaj laboratorioj ligitaj al aeronaŭta armilkonstruado. Oni ankaŭ rafinas oleon kaj gason kaj ilin distribuas.

La urbcentron de Adelajdo ĉirkaŭas la Norda, Suda, Orienta kaj Okcidenta Terasoj (strategoj). La centra strato, kiu dividas la urbon en okcidentan kaj orientan partojn, nomiĝas King William Street. Multaj el la aliaj stratoj portas la nomojn de la originaj direktoroj de la Sudaŭstralia Kompanio. Montefiore Hill, sur kiu staras la statuo de kolonelo Light, estas nomita laŭ granda investinto en la kompanio.

La Naskiĝo de Kolonio - Sud-Aŭstralio 1836

Kiam jam ekzistis establita kolonio sur la orientaj kaj okcidentaj marbordoj de Aŭstralio, la kolonia administracio de Britio jam en la fruaj jaroj de la 19-a jarcento interesiĝis pri la suda marbordo, kiu tiam estis preskaŭ tute ne esplorita.

En proksimume 1820 la kapitano Sturt, de la novsudkimria mararmeo, kaj grupo de ses viroj remis balenboaton la tutan longon de rivero Murray. La raportoj de Sturt pri la bonega tero havebla en la regiono de la elfluejo de Murray interesis multajn.

La brita admirallato komisiis kapitanon Mateon Flinders esplori kaj mapi la marbordon de Sudaŭstralio en ŝipo nomita 'The Investigator'.

Flinders estis bonega naviganto kaj kartografo, kaj kelkaj el liaj kartoj estas ankoraŭ hodiaŭ uzataj ĉe la marbordo de Sud-Aŭstralio.

Hazarde la franca registaro jam komisiis al kapitano Baudin la saman celon en la ŝipo 'La Géographe'. Fine la du ŝipoj renkontiĝis en 'Encounter Bay', sude de Adelajdo, kie nun situas 'Victor Harbour'. La renkonto estis tre amika, ĉar neniu el la du kapitanoj sciis, ĉu iliaj landoj militas aŭ ne.

Tamen, kiam Flinders raportis siajn trovaĵojn al la admirallato en Londono, kaj menciis, ke li renkontis Baudin, la Kolonia Oficejo ekinteresiĝis pri rapida koloniado de tiu ĉi parto de Aŭstralio.

Plurajn jarojn oni dubis, ĉu la uzado de punlaboruloj estas honesta kaj efika en evolukolonio. Iu sinjoro, Edvardo Gibbon Wakefield, jam provis iniciati sian propran projekton, per kiu nur liberaj enmigrintoj ekloĝus en la lando.

Oni decidis akcepti la planon de Wakefield, kaj en Londono en 1834 oni registris la Sudaŭstralian Kompanion. La plano vere temis pri granda tervendado. La brita registaro forprenis la landon de la indiĝenoj kaj vendis ĝin al la enmigrintoj. Tri ŝipoj fine foriris el Londono en 1836 kaj alvenis al 'Holdfast Bay' ĉe 'Glenelg' la 26-an de decembro 1836.

Okazis flag-ceremonio la 28-an de decembro, kaj oni proklamis, ke Sud-Aŭstralio nun estas ŝtato. Post la ceremonio la 2-300 novaj koloniantoj celebris per multe da salita porko kaj rumo.

Sudaŭstralio do neniam estis punkolonio, sed la 'krokodiloj' en tiu ĉi kongreso tre facile povus esti parolantaj la francan lingvon hodiaŭ.

Nia Titolo

La Lumilo estas traduko de la angla "light". Tio estis la familia nomo de la kolonelo William Light (vidu bildon), kiu en la jaro 1836 elektis la lokon por Adelajdo kaj poste konceptis ĝian stratplanon. Lia statuo staras en norda parko, superrigardante la urbon.

Interreligia Diservo

Tiu okazos akurate je la 16-a horo, (ne kiel erare anoncite en la kongreslibro je la 17-a), dimanĉon la 20-an de julio en la kristana kongrespreĝejo, "Scots United Church", kiu situas ĉe la angulo de la stratoj Nordteraso kaj Pulteney strato. Bonvolu vidi la mapon!

Ni planas tre simplan ceremonion, en kiu la reprezentantoj de malsamaj religioj kaj kredoj legos aŭ citos ĝis proksimume tri minutoj el siaj sanktaj verkoj aŭ vortigos propran preĝon. Oni rajtos laŭplaĉe anonci sian nomon kaj devenon, kaj bruligi kandelon antaŭ ol publike voĉadori la Kreinton.

Ni atendas reprezentantojn de almenaŭ la sekvantaj religioj: Bahaismo, Budhismo, Harekriŝnismo, Hinduismo, Homaranismo, Islamo, Judismo, Kristanismo, Oomoto, Sikhismo, kaj Zoroastrismo.

Neniu sentu, ke li devas ĉeesti aŭ informi iun ajn pri sia partopreno, sed vi rajtas tion fari, aŭ skribe aŭ persone al Paŭlo Desailly, ekskursestro. La budo de kongresekskursoj estos je via dispono en la kongreseja enirejo.

Akcepto por kongresanoj

La lokaj bahaanoj - estas en Sud-Aŭstralio 1.400 da ili - honore akceptos la kongresanojn merkredon la 23-an de julio, je la 19h00a, en la "Old Methodist Meeting Hall", 25 Pirie Street, Adelajdo.

Malfermos la feston Kep Enderby. Oni intencas, ke kongresanoj kaj bahaanoj neformale ekkonu unuj la aliajn.

Oni ĝuos multan manĝaĵon kaj persan muzikon.

Atentu artistoj

Se vi volas prezenti eron kiel artisto en granda internacia vespero aŭ en neformala lunĉpaŭza koncerto, bonvolu kunveni kun la arta teamo.

Okazos kunveno je la 17h00, 19-an de julio en ĉambro Linton [5] por artistoj, kiuj volas prezenti.

Lingvapax

Prof. Dennis Cunningham, sekretario de Asocio de Fremdlingvaj Instruistoj de Aŭstralio kaj reprezentanto de UNESKO, prelegos pri la projekto Lingvapax de UNESKO, dimanĉon je la 14h00 en salono Li Hajpin. La prelego estos dulingva, angla kun interpretado en Esperanton.

Indiĝenaj lingvoj

Prof. Rob Amery, Lingvisto de la Universitato de Adelajdo, okupiĝas pri revivigo de du lokaj indiĝenaj lingvoj de Sud-Aŭstralio.

Pri tiu interesa projekto li prezentos video-programon, ĵaŭdon je la 14h00, en salono Ross.

La video estas Anglalingva kun interpretado en Esperanton.

Aŭtobusa pagsistemo

Aĉetinte bileton, memoru validigi ĝin per la maŝino en la aŭtobuso (eĉ se vi ĵus aĉetis ĝin de la ŝoforo).

La maŝino markas ĝin per la horo ĝis kiam vi rajtos uzi ĝin.

La bileto validos du horojn, dum kiuj vi povos fari alian veturon per alia aŭtobuso aŭ tramo.

La prezo varias laŭ la horo. Antaŭ la 9-a kaj post la 3-a la prezo estas \$2.70. Je aliaj horoj ĝi kostas \$1.60.

Oni povas aĉeti dumtagan bileton. Ankaŭ eblas aĉeti 10-foj-uzan bileton en butiko, kiu montras la afiŝon "Metrotrip" .

Tuttagaj Ekskursoj

Bonvolu noti, ke la tuttagaj ekskursoj jam estas praktike tute plenaj. Eblos mendi nur ekskursojn E1 - Barossa Valley kaj E2 - Sperti Coorong (ekiro je la **09h00**, ne je la 08h00!)

Bonvolu mendi kiel eble plej frue, por kapti lokon!

Aliaj ekskursoj ne plu estas mendeblaj. Por duontagaj ekskursoj estos sufiĉaj lokoj ankoraŭ disdoneblaj.

La Urbestra Akcepto

Okazos ĵaŭde je la **17h30 - 18h30** (ne je la 16h00 kiel planite kaj kiel anoncite en la Kongresa Libro).

Ĝi estas nur por tiuj kongresanoj, kiuj ricevis specialan inviton.

Prelego de John Wells

Profesoro John C Wells okazigos publikan prelegon en la angla lingvo pri la temo: *Esperanto; a viable international language? [Esperanto, ĉu vivpova lingvo internacia?]* ĵaŭdon je la 18h00 en la Council Room, 7-a etaĝo, Hughes Building, Hughes Plaza, University of Adelaide. Refreŝigaĵoj ekde la 17h30. Kongresanoj parolantaj la anglan estas bonvenaj en la publiko.

Verkistoj - EVA

Jarkunveno de EVA - Esperantista Verkista Asocio - okazos vendredon je la 15h00-15h45 en salono Ross.

Ankaŭ interesataj ne-membroj estos bonvenaj.

Respondecas S-ino Spomenka timec, KN-ro 1077

La Aŭstralia Nacia Vespero dimanĉon la 20-an de aŭgusto

Aŭstralio estas multkultura societo. Por ĉi tion simboligi, la vespero komenciĝos per tradicia indiĝena prezentado, kiun sekvos muziko kaj dancado el la enmigraj kaj etnaj kulturoj de la lando. Fine de la unua parto, japana tamburado memorigos pri nia libera komunikado kun niaj pacifikaj najbaroj. La dua parto temos pri nuntempa Aŭstralio, inkluzive de traktado de la ĝojoj kaj problemoj, kiujn alfrontas aŭstraliaj Esperantistoj.

La Programo

1. KERIBA SAGUL

Indiĝenaj kantaĵoj kaj dancoj el la insuloj de Torres-markolo kaj el nordorienta Arnhemlando. "Keriba Sagul" signifas "Nia Danco".

2. ANATOLIA

Muzika grupo, kiu jam ricevis akklamon en Viktorio kaj Sud-Aŭstralio. Oni prezentos kantojn el nuntempaj Turkio kaj orienta Mediteraneo, kaj ludos diversajn instrumentojn el tiu regiono.

3. LOS GAMBERROS kaj TITI DE ALGECIRAS

Los Gamberros estas sudaŭstralia grupo, kiu dancas kaj kantas laŭ la stilo flamenka. Titi de

Algeciras estas mondkonata majstro de kantado flamenka.

4. ATARU TARU TAIKO

Aŭstralia grupo, kiu prezentas aŭtentikan japanan festtamburadon.

PAŬZO de 25 minutoj

5. IRON GARDEN (Fera ĝardeno)

Nova danco kun moderna aŭstralia temo. Ĝi estos prezentata de studentoj el la adelajda Centre for Performing Arts, sub la direktado de la finna koregrafo Juha Vanhakartano, kiu gastinstruas tie.

6. TREVOR STEELE, ESPERANTISTO

Prezento fare de la renoma aŭstralia verkisto kaj instruisto.

7. LEIGH WARREN, DANCISTOJ kaj AUSTRALIAN STRING QUARTET

La "Shimmer Shaker" (trembrilaj skuadaj) dancoj el Korda Kvarteto numero 2, de aŭstralia komponisto Graham Koehne.

8. KERIBA SAGUL

Refoje indiĝena muziko el la nordo.

Lastatempaj aliĝantoj

1159 jnej-f S-ino Justyna Janicka, Popiela 7, PL-44-200 Rybnik, Pollando

1160 jncs-m S-ro Stanislaw Janicki, Popiela 7, PL-44-200 Rybnik, Pollando

1161 jnct-h S-ino Teresa Janicka, Popiela 7, PL-44-200 Rybnik, Pollando

1162 aojn-y S-ino Aojama Nacuko, Hon-amanuma 2-44-6 Suginami-ku, Tokyo, 167, Japanio

1163 coui-b S-ino Ĉoubara Jukiko, Usibuka-mati 3594 Usibuka-si, Kumamoto-ken, 863-19, Japanio

1164 oeka-j S-ro Oe Kazue, Ookubo-ryouke 99-2 Ekuseru-1-202, Urawa-si, Saitama-ken, 338, Japanio

1165 ooeh-u S-ro Ooe Hiroshi, Ookubo-ryouke 99-2 Ekuseru-1-202, Urawa-si, Saitama-ken, 338, Japanio

1166 rfsc-k S-ro Rolf Schmidt, Turnhallenstrasse 2, DE-66500 Hornbach/Pfalz, Germanio

1167 rdha-s S-ino Hannah Ridout, 38 Geddes Street, Victoria Park, WA 6100, Aŭstralio

1168 rdou-u S-ino Sheryl Ridout, 38 Geddes Street, Victoria Park, WA 6100, Aŭstralio

1169 djos-o S-ino Slobodanka Djordjevic, Rifata Burdzevica 71, YU-11050 Beograd, Jugoslavio

1170 vcom-d S-ino Veronika Coombes, 6/20 Gower Street, Summer Hill 2130 NSW, Aŭstralio

1171 alyu-q S-ro Aloyzas Urbonas, Giedraciu, 93-49, LT-2042 Vilnius, Litovio

1172 baju-d S-ro Jurgen Bauer, Brahmsstr. 28, DE-73430 Aalen, Germanio

1173 insi-a S-ino Inge Simon, Brahmsstr. 28, DE-73430 Aalen, Germanio

1174 aaho-r S-ro Aaron Holding, 76 Sturt Ave., Colonel Light Gardens 5041, SA, Aŭstralio

1175 jesh-e F-ino Jessica Holding, 76 Sturt Ave., Colonel Light Gardens 5041, SA, Aŭstralio

1176 mrte-w S-ino Elizabeth Mortimer, 409 Military Road, Largs Bay, SA 5016, Aŭstralio

1177 mrtm-i S-ro Arthur Mortimer, 409 Military Road, LargsBay, SA 5016, Aŭstralio

1178 swel-u F-ino Ella Stewart, 50 Grant Rd., Reynella 5161 SA, Aŭstralio

1179 ango-i S-ino Ana Montesinos de Gomis, 82 Waterford Road Fulham, London, Britio SW6 2DR

1180 nptz-z Nikolaos Papatrezis, Solonos 110, GR-54248 Thessaloniki, Greklando

1181 pptb-l Barbara Papatrezis, Solonos 110, GR-54248 Thessaloniki, Greklando

1182 glym-n Glyn Truscott, 2 Hamilton Street, Vale Park 5081 SA, Aŭstralio

1183 slll-z F-ino Karima Sills, 9 Ballantyne Street, Thebarton 5031 SA, Aŭstralio

1184 azfa-u F-ino Azar Zenous Faraji, No 80, kh. 6 Park-vey (Shahid Chamran), Tehran 14-417, Irano

1185 fzmr-b S-ro Mohammad Reza Faraji Zenouz, No 80, Kh. 6Park-vey, Tehran 14-417, Irano

1186 sija-t S-ino Sija van Wijngaarden, Helgaflats 6'eme Hendrick Staersweg 427, NL-3067 VV Rotterdam, Nederlando

Numero 2 - lundo 21-a julio 1997

La 83-a UK en Montpellier, Francio

Deĵoranto ĉeestos ek de mardo je la 9-a horo ĉe la giĉeto. Vi trovos tie informilojn kaj aliĝilojn.

Se vi havas tre specifajn demandojn, kontaktu la prezidanton de LKK Claude NOURMONT [KN 660].

Artikoloj...

Materialon por La Lumilo bonvolu lasi ĉe la Informejo. Estas tie raportiloj, kiujn vi povas uzi.

Publika fotokopiilo

Troviĝas en La Verda Kanguruo.

Sanservo

Pro sanproblemoj iru al la Informejo, kie troviĝas simplaj solvoj. Se vi estas tre grave malsana, oni vokos kuraciston al la Informejo.

La Lumilo

Estas senpaga, sed se vi prenos pli ol unu ekzempleron, bonvolu pagi po 20 cendojn.

Literaturaj duonhoroj

Mardon je la 16-a horo, Spomenka Štimec prezentos fragmenton el sia priaŭstralia novelo "La Aŭstralia Pupo". Ŝi ankaŭ aŭtografos siajn librojn (Ombro sur interna pejzaĝo, Tena, ktp.) kaj respondos al demandoj.

–aŭdon je la 16-a horo, Harald Schicke (La korpo de la homo, Germanaj bieroj kaj bierkulturo) faros same. Ambaŭ renkontiĝoj okazos en la Libroservo.

Pliaj aŭtoraj duonhoroj estas organizotaj. Interesatoj anoncu sin ĉe István Ertl, n-ro 401.

IKU prelegantoj subskribas

Ĉu vi deziras renkonti la prelegantojn de la Internacia Kongresa Universitato?

Ili partoprenos la aŭtoran IKU-horon en la Libroservo, lundon inter la 15-a kaj la

16-a horoj, kaj aŭtografos la IKU-libron, kiu enhavas iliajn prelegojn. Pli ol 70 paĝoj, kvin prelegoj, aŭtoraj subskriboj - ĉio kostas nur 6 A\$.

Rondo kata, katamikaro

Okazos kunveno en ĉambro Ross, kunvenejo 10, lundon la 21-an je la 14-a horo.

Arboplantado

Antaŭ kelkaj jaroj ni komencis planti pacarbon okaze de Esperanto-kongreso aŭ somerkursaro. Troviĝas tri tiaj arboj ĉirkaŭ la pacostango oriente de Sir Edwin Smith Avenue, Nordadelajdo, proksime al la malsanulejo por virinoj kaj infanoj.

Du pliaj troviĝas en la parko `Pennington Gardens' okcidente de King William Road, Nordadelajdo, inter la rivero kaj la katedralo Sankta Petro.

—aŭde je la 16-a, en ĉi-lastata loko, okazos plantado de Esperanto-arbo. Ĉiuj kongresanoj estas kore invitataj partopreni por kuncelebri la okazon.

Vizitu aborigenan kolezion - Taundi

Profesia instruisto de la angla, samideano Sandor Horvath, kiu instruas en Taundi, aborigena lernejo en Port Adelaide, gvidos ekskurson tien merkredon la 23-an de julio.

Ekskursanoj inspektos mapon, montrantan pratempajn tribajn limojn. Oni eksponos aborigenajn artaĵojn. La ekskurso estos kvazaŭ interkona afero, ĉar la aborigenoj interesiĝas pri la internacia lingvo. Pro tio ĝi estos senkosta, sed oni devas esti preta prezenti sin kaj la hejmlandon, por pruvi la utilon de Esperanto. Bonvolu amasiĝi ĉe la kongreseja ekskursbudo 30 minutojn antaŭ tagmezo.

La trajno foriros je 12h07.

Vizitu Glenelg-on

Glenelg valoras la penon viziti. Tion vi povas fari per tramo, kiu ekiras el Victoria Square laŭ King William Street.

En Glenelg, vizitu la restoracion "Buffalo". Ĝi replikas la ŝipon, kiu alvenis al Holdfast Bay la 26-an de decembro 1836.

Lingvo kaj Paco: Lingvopax

Denis Cunningham, reprezentanto de UNESKO kaj ĝenerala sekretario de Internacia Federacio de Instruistoj pri Vivantaj Lingvoj, prezentas la projekton. Ĝin UNESKO iniciatis en 1987, konstatinte, ke plurkulturaj socioj kaj lingva diverseco ludas ĉiam gravan rolon.

La ideo estas, ke lingvoinstruado devas kontribui al edukado por paco. Ĉar

Esperanto estas jam internacia komunikilo, ĝi povas taŭgi kiel perilo por tiu celo.

Unu voĉo

Ewe-calyptus, la muzikgrupo por la balo, tre kuraĝe kaj malavare konsentis surkompaktdiskigi kantojn el la aŭstralia kantaro. Ok el la kantoj aŭdeblas duan fojon, sen vortoj, por ke oni povu "karaoke"-stile kunkanti. Unu el la kantistoj havas fortan aŭstralian prononcmankon, sed preskaŭ ĉiuj liaj kantoj aŭdeblas ankaŭ senvorte. Eventuala profito iros al la Aŭstralia Esperanto-Asocio, do ni petas, ne piratkopiadu. Kaj la kvalito de la muziko? Vi nur aŭskultu!

Se vi jam aĉetis la kompaktdiskon, bonvolu kontroli, ĉu fakte estas disko en la skatolo. Se ne, reportu ĝin al la memoraĵo-vendejo.

Biciklaj ekskursoj

Dum la kongreso vi havos eblon partopreni du biciklajn ekskursojn, organizitajn de la loka bicikla klubo kaj Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI). La unua ekskurso okazos mardon je la 10-a horo ekde la North Adelaide Railway Station. Oni biciklos 40 kilometrojn tra la kamparo je 20 kilometroj hore. La dua ekskurso okazos sabaton je la 13-a horo ekde Victoria Square. La distanco estos 25 kilometroj je malstreĉa rapideco. La unua ekskurso taŭgas por iom spertaj biciklantoj, la dua por nespertaj biciklantoj. Vi estas petataj kunporti proprajn biciklojn.

Bonvolu vin turni al s-ino Yvonne van den Hork [kn 244] dum la lunda lunĉpaŭzo en la Verda Kanguroo apud la afiŝtabulo, por aliĝi kaj ekhavi informojn kiel akiri biciklon. Maksimuma kvanto da partoprenantoj: 20 homoj.

Aŭstralia somerkursaro

La venonta aŭstralia somerkursaro okazos en Ipswich, Kvinslando, en Januaro 1998. Tiuj, kiuj volantas helpi pri la programo kaj la preparoj, bonvolu ĉeesti kunsidon en ĉambro 8, vendredon la 25-an je la 16-a horo.

La bekmamulo

La ornitorinko certe prezentis al la pioniroj tre strangan beston. La unua ekzemplo, kiun ili sendis al Anglio en 1797, estis ne akceptita kiel vera besto. Oni kredis ke iu fabrikis ĝin el ansero kaj talpo.

Eble tiu klarigas kial la fruaj pioniroj nomis ĝin anserotalpo. La tiutempaj biologiistoj unue donis al ĝi la genron Platypus (Greke platapiedulo) sed poste ili trovis, ke iu jam uzis tiun nomon por skarabo kun plataj piedoj. Do, la sciencistoj ŝanĝis la genron al Ornitorinkus (Birdbekulo).

Malgraŭ tio, la ordinaraj homoj daŭrigis la nomon platypus [platipus]. La specion la biologiistoj nomis "anatinus". Tiu signifas anaseca.

Estis pli facile trovi genron kaj specion ol klason por la besto. Ĉu ĝi estas amfibio?

Ĝi vivas multe en akvo. Ĉu ĝi estas birdo? Ĝi havas bekon kaj palmopiedojn. Ĉu ĝi estas rampulo? Ĝi kovas ovojn. (Ne estis ĝis ĉ. 1885 ke iu tion eltrovis). Ĉu ĝi estas mamulo? Ĝi havas felon kaj mem altigas la korpotemperaturon, kaj la ino nutras la idojn per lakto.

Pro la lasta kialo oni decidis klasi ĝin kiel mamulo.

Sed kia mamulo? Ĝi ne havas poŝon tial ne estas marsupiulo. Ial sciencistoj donis al ĝi la ordon "monotremata" (Greke unutruulo) aŭ "kloakulo". Domaĝe, ĉar tiu ordo ne vere apartigas ĝin de aliaj mamuloj.

Do ni akceptu la nomon ornitorinkon en Esperanto. Sed eble por similigi la ofte uzatan nomon Platypus taŭgus Platabuŝulo.

Mesaĝo al la patronoj de TEJO

Karaj amikoj de TEJO, koran saluton al vi en la UK. Kutime mi, aŭ alia TEJO-reprezentanto, persone direktas tiujn vortojn al vi dum la tradicia Akcepto de Patronoj.

Bedaŭrinde, ni ne sukcesis aranĝi tiun ĝuindan kunestadon ĉi-jare, ĉar tre malmultaj TEJO-aktivuloj ĉeestas la UK-on. Pro tio mi elektas tiun ĉi vojon por esprimi al vi mian grandan dankon pro via valora subteno.

Mi esperas ke vi tamen renkontos kelkajn junajn ĉeestantojn, kaj mi certas ke estas vi niaj plej bonaj ambasadoroj por kuraĝigi ilin kaj entuziasmigi ilin pri nia laboro.

Havu bonan kongreson!

Nome de TEJO salutas Danny ten Haaf - Prezidanto.

Faka agado

La faka giĉeto funkcios dum la tuta kongreso, kaj fakoj asocioj povas ĝin uzi libere. Ĝi troviĝas en La Verda Kanguruo. Se vi deziras pli bone konatiĝi kun la faka kaj scienca agadoj de UEA aŭ informiĝi kiel aliĝpeti al UEA kiel nova faka asocio, venu al la faka forumo, vendredon je 10h30 en salono Ross.

Gazetara Konferenco

La 19-an de julio posttagmeze ĵurnalistoj kaj raportantoj de E-gazetoj, radio-programoj kaj farantoj de filmoj konatiĝis kun la prezidanto de la kongreso, la prezidanto de LKK kaj membroj de la kongresa "Gazetara Servo".

Prezidanto Lee informis pri la agado de UEA ĉe UN. Kvankam lingvaj problemoj kaŭzas grandan prokraston kaj koston por la organizaĵo, la aktualaj proponoj de la Ĝenerala Sekretario ne ampleksas interpretadon aŭ tradukon. Sed tio eble estos okazo por UEA akiri publikigon pri la problemo.

Oni notis, ke la lanĉo de la libro verkita de Profesoro David Crystal, pri la angla

lingvo, ĵus donis okazon por parolado de D-ro John Wells pri Esperanto. (Vidu "La Lumilo" numero 1).

Prezidanto Lee informis ankaŭ pri tio, ke D-ro Claude Piron lastatempe persvadis la Altkomisiiton de UN pri Homaj Rajtoj akcepti kiel oficialan tekston la E-tradukon de la Deklaracio Pri Homaj Rajtoj, faritan de D-ro Piron, D-ro Ralph Harry, Eskil Svane kaj aliaj diplomatoj, juristoj kaj lingvistoj.

D-ro Harry informis, ke membroj de EJA (la asocio de juristoj) preparas, kun la helpo de d-ro Piron, definitivajn tekstojn de ĉirkaŭ dudek dokumentoj, kiaj La ĉarto de UN, La Konvencioj pri Homaj Rajtoj kaj la Rajtoj de Infanoj, la Traktato pri Diplomatiaj kaj Konsulaj Rilatoj.

Oni intencas meti tiujn tekstojn sur la Interreton, dum la Aŭstralia Registaro same faros por la anglaj versioj.

S-ro Andrzej Pettyn sugestis, ke estu en venonta kongreso "Tago pri Informado", en kiu ĉiuj kongresanoj lernu pri la praktikaj aspektoj de poresperanta informado.

Oni sugestis organizi okazon ankaŭ por pli ampleksa diskutado pri la "interna ideo" de Esperanto.

Internacia ILEI-konkurso

Gvidanto de la konkurso, s-ro Géza Kurucz, kompilis specialan kongresan numeron. Vi estas petataj transdoni viajn respondojn al la budo de ILEI ĝis la ĵaŭda vespero (22-a de julio je la 17-a horo). Rezultoj vendrede. Pli da informoj pri la konkurso troveblas ĉe la ILEI-budo.

1. Malkonfuzu la bestonomojn: kropo, morderado, noleo, rosepa, agmeelro, laoko.
2. Skribu almenaŭ ses dusilabajn vortojn kun la finaĵo "oro".
3. Li malgaje pasis tie du semajnoj. Korektu la erarojn.
4. Kompletigu la proverbon: Ju pli ... la sonĝo des pli ... la vekiĝo.
5. Kompletigu per posesivoj: Mia kuzino multe ŝatas ... dormoĉambro. Ŝi tre bele ornamis ĝin. Ĉiuj diras al ŝi, ke ... ĉambro estas plej agrabla. ... gepatroj multe elspezis por la ornamado de la ĉambro de ... filino, kiu nun mirigas ĉiujn per ... raraj mebloj kaj pentraĵoj.
6. Kiujn periodaĵojn eldonas ILEI?
7. "Ni estas movado por efika transnacia edukado." El kio la citaĵo?
8. Esperanto aperis en Aŭstralio en la jaro 1905 sub la gvido de Robert Booth. En kiu urbo?

Ligo de samseksamantoj

La ligo de samseksamaj geesperantistoj (LSG) kunvenos je la 19-a mardon, antaŭ la salono "La Verda Kanguruo", por iri kune al neformala renkontiĝejo.

Oni proponis, ke ĉi tie oni ne rajtas diri "krokodili" - devas esti "kangurui" - salti de

unu al alia lingvo.

Flosanta pasteĉo

Tre proksime al la kongresejo troviĝas pasteĉvendejo. Ĝi situas tuj antaŭ la fervoja stacidomo, kaj facile troveblas, se vi nur sekvos vian nazon. Multajn jarojn ĝi pasigis tie, kaj jam antaŭ longe fariĝis sudaŭstralia tradicio.

Ne nur adelajdanoj, sed ankaŭ multaj aliaj sudaŭstralianoj, kiel ankaŭ turistoj el tuta Aŭstralio kaj eĉ el la tuta mondo, venas kaj aĉetas siajn pasteĉojn tie.

Al la kongresano, kiu, manĝinte unu, submetos al "La Lumilo" la plej amuzan priskribon de ĝi, ni donos premion.

Ĉu vi postkongresos en Nov-Zelando?

Se vi jam aliĝis al la novzelanda ekskurso, kiu komenciĝos la 30-an de julio, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sciigi la ekskursan servon, ĉe la giĉeto en la ekspoziciejo, pri la precizaj detaloj, ekz. kiam vi alvenos al Aŭklando kaj la flugnumero, kaj viaj nomo kaj kongresnumero, por ke ni povu bonvenigi vin kaj akompani vin al la hoteloj, "Quality" kaj "Logan Park".

Ni antaŭĝuas interkonatiĝon kaj agrablajn travivaĵojn en Aotearoa.

Sepa-taga Adventista diservo

Okazos Sepa-taga Adventista diservo sabaton en Angas Street en Adelajdo. Se plaĉus al iu ĉeesti, bonvolu demandi al Margaret Chaldecott, kiu loĝas en la domo Cathcart [kn 563].

Internacia Kongresa Universitato

Esperanto estas unika fenomeno en la soci-kulturo de lingvoj, kaj la Internacia Kongresa Universitato estas unika institucio ene de la fenomeno Esperanto. Ĝi rekte ligiĝas al la rolo de Esperanto en la scienco kaj en universitata instruado.

En la pasintaj jaroj UEA klopodis eldoni la tekstojn de la prelegoj - kutime post la kongreso. Tamen ofte en internaciaj sciencaj konferencoj, kaj ankaŭ en ordinara universitataj kursoj, la tekstoj de la prelegoj estas haveblaj antaŭe.

Ĉi-foje UEA eksperimente provas sekvi tiun metodon, ofertante la IKU tekstojn komence de la kongreso, haveblaj al ĉiuj kongresanoj - ne nur al la partoprenantoj de la IKU. Tio ebligas al la aŭskultantoj utiligi la tekstojn por prepariĝi kaj por pli bone sekvi la prelegojn. Tio ankaŭ ebligas al tiuj kongresanoj, kiuj ne povas viziti ĉiun prelegon, tamen konatiĝi kun la enhavo.

En la broŝuro vi trovos la tekstojn de tiuj IKU prelegantoj, kiuj liveris siajn tekstojn antaŭ la UK. La IKU broŝuro estas 70-paĝa, enhavas la tekstojn de kvin prelegoj, kaj estas aĉetebla por nur 6A\$ ĉe la Libroservo kaj en la IKU prelegoj.

El Popola Ĉinio

Kunsido de legantoj de El Popola Ĉinio okazos 9:00-10:00, 22-an, mardon, en salono Hodler.

Prelego de Konfucea profilo pri konfuceanismo okazos 15:15-16:15, 22-an, mardon, en salono Hodler. Vi aŭdos, kion instruas la majstro al la posteculoj 2000 jarojn poste.

Duonkripta krucvortenigmo

Horizontale

1. Antaŭa.
3. Son', kiun faras pura vitro senigita je brutoloĝejo.
5. Dorsa elstaraĵo.
7. Havas la ĝustan ideon kaj sen krampo aliformiĝas.
9. Bird' estas membro.
10. El kontrabaso nova aŭdeblaĵo.
11. Pro tio, ke mankas al la durada veturilo finaĵo.
12. Stanco, kiu, rilatigite al dombesto, estus subita konsterna okazaĵo.
14. Riĉa je iu elemento esprimanta estran volon.
17. Apartenanta ekskluzive.
19. Metamorfozo.
20. Konforme al la dudek-sesa litero.
21. Page prunteprenas per reordigo de la ordono, ne malhelpu!
23. Sidrimedo kun la supozo, ke sekvas interjekcio.
25. Manier' rigardi aferon.
26. En tia maniero, en kia oni devas kapti elefanton.
27. Poemo, kiu legiĝas same ambaŭdirekte.
28. Virino, kiu estus deziriga, se ĉe la komenco ŝi inversiĝus.

Vertikale

1. Rilata al seninteresiĝo.
2. Havos koran inklinon al profeto.
3. Monaĵa kapvesto.
4. Ideologio el postecularo, en kiun enmetiĝis Esperanto.
5. Sentas plezuron pro.
6. Unuartista muzikaĵo rearanĝita en ĉefurbo.
7. Faras petolan salton.
8. Tintilet'.
12. Lavpurigil' inverse rilata al preterir'.
13. Malproksimen.
15. Speco de stang' troviĝanta en sekure ligitaj etendaĵoj.
16. Unupunkta kartonfolieto.
18. Alvoko al batalo.
19. Tempo, en kiu la pacigantoj estas pretaj ekveturi.
21. Organa likvaĵ'.
22. El seri' da nomoj fariĝas esprimmanier'.
23. Forta tremigo.
24. Nulo apartenanta al ni, apartenanta al iu.

La solvo aperos mardon. Samtempe ni prezentos novan krucvortenigmon. Se vi trovos la enigmon ne tro malfacila, la redakcio volonte ricevos viajn solvojn. La unua submetinto de la ĝusta solvo ricevos premie ekzempleron de la morgaŭa numero de "La Lumilo". Ankaŭ, se li aŭ ŝi ne protestos, ni publikigos ŝian aŭ lian nomon.

Numero 3 - mardo 22-a julio 1997

Statuoj

Frue la statuo de Kolonelo Light (vidu La Lumilo-n, n-ron 1) staris en Viktoria Placo, kaj personoj kutime supozis, ke li fingromontras kaj diras, "Kiu iras tie?" Estis ankaŭ statuo de Charles Stuart: li staris kun mano ĉe la okuloj kaj diras, "Kie?". Tria statuo estis tiu de George Bass, kiu staris rekte, manoj ĉe la korpo, dirante "Mi faris".

Antaŭ ĉirkaŭ 30-35 jaroj, oni translokiis la statuon de kolonelo Light al monteto Montefiore, tial ke li nun fingromontras al la urbego kaj diras "Jen loko por vilaĝo".

Aferoj UEA-aj

La komitato de UEA kunsidis lundon, la 21-an de julio.

Dum la trakto de la estrara raporto oni ĉefe diskutis pri landa agado kaj la rilatoj kun eksteraj instancoj. Raportiĝis, ke la rilatoj kun UNESKO nun estas pli fortaj ol antaŭe, pro nova ordigo de la kunlaboro kun neregistaraj organizaĵoj kaj pro pli aktiva agado flanke de UEA. Do la landaj asocioj estas invititaj starigi kunlaboron kun la UNESKO-komisiono de la koncerna lando.

La jarraporto de la estraro estis akceptita senŝanĝe.

La komitato decidis labori laŭ la gvidlinioj prilaboritaj por Kampanjo 2000. Oni ankaŭ invitas la landajn asociojn labori laŭ tiuj prioritatoj. Per siaj propraj laborplanoj la landaj asocioj devas prioritati la por ili plej gravajn erojn. UEA gvidos la laboron per nova komisiono elektita de la komitato. Ĝi konsistas el prezidanto Lee, S-ro Corsetti kaj S-ro Buller.

Poezia bukedo

Suzanne Holton diras, ke kiam ŝi komencis lerni Esperanton ŝi decidis serĉi poemon, kiun ŝi povos adapti al muziko. Ŝi estis tre ekscitita trovi kolekton da Esperantaj poemoj de Bertram Potts. Laŭ ŝi, ili preskaŭ per si mem kantiĝis.

Ŝi aranĝis tri el ili, kiujn lernis la partoprenantoj en la aŭstralia somerkursaro en Januaro 1997. Responde al kuraĝigo, ŝi poste muzikigis pliajn tri kaj eldonis ĉiujn ses en volumeto, kiun oni povas aĉeti aŭ en la Libroservo aŭ de s-ino Holton mem.

La titoloj de la kantaro estas:

- Mi krias hura
- Pluvonubo
- La ligna lulĉevalo

- La ŝafideto
- Se nur mi estus rubekolo
- La sablokastelo.

Juna kantistino

La aŭskultantaro ĉe la hieraŭa lunĉpaŭza koncerto estis tute sorĉita de la kantado de ok-jara Emese Kochardy el Ipswich. La ĉarmulino prezentis en Esperanto, purvoĉe kaj klarvorte, ses kantojn, ĉefe aŭstraliajn. Ŝi uzis la mikrofonon kun memfido, estis vortperfekta, kaj tute kaptis la atenton de la ĉeestantaro. Gratulojn al ŝi, kaj al ŝiaj instruistoj kaj lingvaj kaj muzikaj.

Sonbendoj

Oni surbendigas multajn sesiojn de la kongreso. Sonbendoj estas vendataj en Verda Kanguruo. Por grandaj kvantoj, mendu ĝis vendredo 15h00, kaj ili estos haveblaj je sabato.

Mesaĝoj

Ne forgesu serĉi vian kongresnumeron sur la mesaĝotabulo ĉe la enirejo de La Verda Kanguruo.

Aŭtoraj duonhoroj

Estas jam aranĝitaj pliaj renkontoj kun aŭtoroj. Amri Wandel estos en la Libroservo mardon la 22-an de julio, je 15h30. Gilbert R Ledon faros same ĵaŭdon la 24-an, je 11h00. Trevor Steele (Sed nur fragmento, Falantaj muroj, Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen, kpt.) estos tie vendredon la 25-an, je 16h00.

Eblas organizi pliajn "aŭtorajn duonhorojn". Interesatoj bonvolu sin anonci ĉe Istvan ERTL [kn 401].

Hungara renkontiĝo

La renkontiĝo okazos vendredon vespere en antaŭurba restoracio. Ni kolektiĝos je 17h00 antaŭ La Verda Kanguruo. Venu ĉiuj, kiuj volas kontaktiĝi, kaj praktiki la patrinan lingvon, kun la nun-hungaraj samideanoj. Pluraj informoj estas haveblaj (kongresaj numeroj 646 kaj 751).

Kie fumo, tie fajro

Ni konscias, ke la plej multaj kongresanoj ne fumas, kaj ke fumado certe ne sanigas (kio pri drinkado?). Tamen apenaŭ kredeblas, ke en la tuta granda kongresejo ekzistas eĉ ne unu eta ĉambro, kie

fumantoj povas agrable sidi kaj babili inter si. Starado ekstere estas ĝena kaj malkomforta, precipe kun konsidero al la malvarma vetero.

Ekskurso al Hahndorf

Okazos vendredon 25-an de julio, je 9h30 ĝis 13h00, duontaga ekskurso en histoririĉa Hahndorf. Hahndorf estas unikstila aŭstralia vilaĝo en la adelajda montetaro. Abundas en la ĉefstrato belegaj kaŝtanaj kaj ulmaj arboj. La plimulto el la konstruaĵoj jam estas zorge riparitaj. La urbeto havas malstreĉan, malnovmondan etoson. Oni promenos por ĝui la "metiajn" butikojn kaj la germanan kulturon.

Kangurua Insulo

Bonvolu atenti pri la merkreda ekskurso al Kanguruinsulo. Kontrolu zorge vian biletan, ĉar tri apartaj komencaj horoj ekzistas. Ne ĉagreniĝu, se via kunulo komencos je malsama horo, ĉar ni ĉiuj renkontiĝos sur la insulo.

IKU prelegantoj subskribas

Ĉu vi deziras renkonti la prelegantojn de la Internacia Kongresa Universitato?

Ili partoprenos la aŭtoran IKU-horon en la Libroservo, hodiaŭ inter la 15-a kaj la 16-a horoj, kaj aŭtografos la IKU-libron, kiu enhavas iliajn prelegojn. Pli ol 70 paĝoj, kvin prelegoj, aŭtoraj subskriboj - ĉio kostas nur 6 A\$.

Enigmo

Kio estas verda ekstere kaj ruĝa interne, havas nigrajn semojn, kaj povas salti tiom alten kiom la turo Eifel?

La respondo estas akva melono. Ĝi estas verda ekstere, ruĝa interne kaj havas nigrajn semojn.

Do kio pri saltado tiom alten kiom la turo Eifel? La akva melono ne povas salti tiom alten kiom la turo Eifel. Sed kiom alten povas salti la turo Eifel?

Kongresa kantogrupa

Ĉiu, kiu deziras partopreni neformalan kantogrupon, bonvolu kontakti Kay Andersen aŭ Gaye Phillips ĉe la loĝiga servo pri la aranĝo de provkantado.

Lingvoj forte minacataj!

Daniele Vitali (kn 880) lertlingve prilumis la situacion de la lingvoj de la malgrandaj nacioj en Eŭropo, kadre de sinprezento de IKEL, la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj. Estas interese, ke ekzistas multe pli da minoritataj lingvoj ol oficialaj. Kelkaj el tiuj minoritataj lingvoj estas subtenataj de la ŝtato kaj revigligataj (ekz. la romanĉa), dum aliaj suferadas la sorton de marĝenigo kaj pereigo (ekz. la alzaca, bretona). IKEL estas organizaĵo, kiu intervenadas ĉe koncernaj oficialaj instancoj por forigi diskriminaciojn kontraŭ etnoj kaj raportadas en sia informilo "Etnismo".

Vizito al aborigena kolegio

Kiel sciigite en la hieraŭa numero de La Lumilo, Sandor Horvath gvidos ekskurson

al la aborigena kolegio merkredon la 23-an de 11h30 ĝis 4h00. Se vi interesiĝos bonvolu skribi vian nomon sur la listo ĉe la ekskursa budo. Bedaŭrinde nur 20 povas partopreni.

Bonvolu noti, ke pro tio, ke La Verda Kanguruo estos fermita morgaŭ, merkredon la 23-an, ni ne povos amasiĝi ĉe la ekskursa budo, kiel anoncite en La Lumilo hieraŭ. Anstataŭe oni renkontiĝu antaŭ la pordo de La Verda Kanguruo.

Salutmesaĝo de Kofi Annan, ĝenerala sekretario de UN

Ĝoje mi salutas membrojn de la Universala Esperanto-Asocio kuniĝantajn en Adelajdo por ilia 82-a kongreso.

La temo de via kongreso— toleremo kaj justeco en multkultura socio—estas esenca demando por multaj homoj. Ni devas pritrakti du kontraŭajn tendencojn en nia hodiaŭa mondo. Tiom da aspektoj de niaj vivoj ekonomiaj sociaj kaj kulturaj interligiĝas je tergloba skalo, unuigante la homaron kiel neniam antaŭe. Samtempe aliaj fortoj laboradas, estigante la dividon kaj subdividon de blokoj, nacioj kaj eĉ urboj.

La lingvo havas rolon en ambaŭ ĉi tiuj tendencoj. Ĝi povas kunigi la homojn; oni povas uzi ĝin por disigi nin kaj tenu nin apartaj. La lingvo povas esti repacigilo, kaj la lingvo povas esti batalilo.

Unuiĝintaj Nacioj stariĝis kun la celo servi kiel centro por harmoniigi la agadon en nacioj, dum ili celas atingi amikajn rilatojn kaj internacian kunlaboradon. Interkomunikado estas tute fundamenta por tiu celo. Ni havas mesaĝon por proklami —mesaĝon kiu centriĝas je justeco, toleremo kaj homaj rajtoj. La organizaĵo dependas de la multaj neregistaraj organizaĵoj, kiuj laboras kune kun ĝi por helpi komuniki la mesaĝon je la popola, aparte je la loka nivelo.

Mi estas dankema al la Universala Esperanto-Asocio pro ĝia laborado por antaŭenigi lingvon kiel rimedon por kunigi la homojn kaj pro ĝia deziro celebri la universalan deklaron pri homaj rajtoj dum ni alproksimiĝas al la kvindeka datreveno de ties akcepto. Mi esperas, ke reveninte al viaj komunumoj vi ĉiuj helpos enfokusigi la atenton sur ĉi tiu gvidsigna atingo en la strebado por certigi vivon de digneco por ĉiuj.

Mi deziras por vi ĝueblan kaj fruktoplengan semajnon en Adelajdo.

Aŭkcio

Memoru, ke la nepreterlasebla aŭkcio okazos vendredon, ekde 10h30. Do ne tro ŝarĝu vian buĝeton per akiro de bumerangoj kaj diĝeriduoj. Retenu vian financan bonstaton ĝis la aŭkcio!

La aŭkciaĵoj estos montrataj en la libroservo ĵaŭdon inter 10h00 kaj 12h00.

Rondo Kato

La Rondo Kato okazigis sian kunvenon lundon la 21-an de julio, de 14h15 ĝis 15h00, en salono Ross.

La kunvenon gvidis Bob Felby. Li parolis pri la kongresa temo: toleremo kaj justeco en "multkultura" socio. Li diris, ke la aŭstralia registaro ne montras multe da toleremo aŭ justeco al la sendefendaj katoj. Partoprenis 17 katamantoj el 8 landoj. Oni sin prezentis, kaj priparolis siajn katojn.

Monda turismo

Monda Turismo kutime organizas grupvojaĝon al UEA-Kongresoj. Ankaŭ nun al Adelajdo venis grupo de 19 geesperantistoj el Pollando kaj Litovio. Planita estis alveno de 24 personoj, sed pro neesperantistaj problemoj kvin restis hejme. Nia programo en Aŭstralio konsistas el busvojaĝo Adelajdo-Melburno-Kanbero-Sidnejo-Brisbano kun du tagoj en Sidnejo. Dum la tuta tempo akompanas E-gvidanto.

Forveturo el Adelajdo la 26-an vespere kun alveno en Brisbano matene la 1-an de aŭgusto.

Esperanta poŝtmarko

En Kroatio aperis nova poŝtmarko pri Esperanto. Ĝi estis eldonita okaze de la unua kongreso de kroataj esperantistoj en majo 1997. Sur ĝi aperas la portreto de Zamenhof. Se vi estas kolektanto, serĉu vian ekzempleron en la Libroservo.

Esperanta monero eldonita okaze de la sama kongreso estas akirebla ĉe Kroata Esperanto-Ligo.

Porvirina movado

Ni varbas membrojn, kiuj havas intereson pri la porvirina movado. Ni intencas fondi fakan asocion, kiu ĉefe traktos pri seksaj diskriminacioj. Se vi interesiĝas pri tio, bonvolu lasi vian nomon kaj kongresan numeron sur mesaĝa tabulo aŭ sendi ilin rekte al la suba adreso.

Ni unue varbas membrojn, kaj poste organizos fakan asocion, kiu kunlaboros kun UEA. Ne estas laŭseksa limo. Se eblos, ekde la venonta jaro ni okazigos fakkunsidon kadre de la UK.

Kontaktadreso: CHOI YUN HUY, Hortensio, Yeogchon 1 dong 32-37, Eunpyeong-gu, Seoul, 122-071 Koreio.

Dankon

Oni petis nin danki la afablajn esperantistojn, kiuj trovis kaj redonis la sakon forlasitan en la Sud-Aŭstralia Muzeo.

Festa koncerto

Ĉu vi ŝatis la muzikon kiun la LKGT Kvarteto ludis dum la solena inaŭguro, sabaton matene? Se jes, vi povos ĝui pli da bona muziko ĉe duhora festa koncerto, kiun la Kvarteto prezentos en halo Zamenhof ĉi-vespere, mardon la 22-an. La koncerto ekkomenciĝos je 20h00. Pli da informo pri la kvar talentaj junaj kordinstrumentistoj vi trovos sur paĝo 43 de la Kongresa Libro.

Zamenhofa spektaklo

Jadwiga Gibczynska estas ne nur profesia aktorino, sed ankaŭ verkisto, reĝisoro kaj surscenigisto. Tiun aron da talentoj ŝi manifestos ĉi-vespere (mardon, la 22-an) en halo Lapenna, de 16h30 ĝis 17h30, kiam ŝi prezentos sian spektaklon, Zamenhof .

Alian teatraĵon, *Noemi*, verkitan de Paul Gubbins, ŝi prezentos en halo Linton vendredon la 25-an, je 17h00.

Konversacia rondo n-ro 2

La rondo okazas ĉiutage en la salono Linton (n-ro 5). Ĝin gvidas Andreo Pettyn el Pollando [kn 1137]. La temo estos paroligaj strukturismaj ekzercoj kaj la prononcado en praktiko.

Oni vigle konversacias samtempe lernante la gvidadon de studrondoj por poste utiligi la spertojn en la hejmloko. Oni konatiĝas kun kelkaj "studmaterialoj" de A Pettyn, i.a. "La E- Fonetiko en Praktiko", "Esperanto en dialogoj" kaj "Laŭtemaj E-konversacioj". En la konversacia rondo regas amika etoso kaj bona humoro.

Foto-servo

Vi povas lasi viajn filmojn ĉe la fotoservo antaŭ 13h00 kaj kolekti ilin la postan tagon je 13h00.

	unu aro	du aroj
12 fotoj	\$6.00	\$10.00
24 fotoj	\$8.00	\$13.00
36 fotoj	\$11.00	\$17.00

Mesaĝo el Okcidenta Aŭstralio

Ni ricevis de Okcidenta Aŭstralio la jenan mesaĝon: "Ni bondeziras al vi sukcesan, profitodonan kongreson. Prezidanto kaj anaro de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio."

Ekskursoj

Por preskaŭ ĉiuj ekskursoj necesas ŝuoj taŭgaj al promenado. Ni konsilas, ke tiuj, kiuj inklinas al vojaĝmalsano, glutu medikamenton antaŭ ekskursoj al Kanguruinsulo, Coorong, Barossa kaj Kamparaj Travivaĵoj.

Warrawong estas pli malvarma ol Adelajdo. Por ĝi oni bezonas gantojn kaj dikajn, varmigajn ŝtrumpetojn. Kunportu la kantaronojn al la tuttagaj ekskursoj.

Bonvolu noti, ke oni rajtas manĝigi bestojn kaj birdojn en Cleland per nur tie aĉetita nutraĵo, kaj tute ne sur Kanguruinsulo.

Duonkripta krucvorttenigmo

Horizontale

1. Altgrade kun uzo de nevira tempo.
8. Simpla homo.
9. Plene malsekigit'.
10. En altvalora violon ĉelo troviĝas manĝaĵo.
11. Fari dumdorman bruon, reordigante subitan voĉan sonon.
12. Mankas finaĵo al tio ĉi.
14. Tamen.
16. Interne de cirklo estas monunujo.
17. Kiel oni povas ricevi sciigon, prilaborante iun metalon.
18. Stumbl'.
20. Fari, ke io konformu al la postuloj de senpartia traktado.
22. Noktaj birdoj.
23. En vere spektema homo kuŝas estim'.
24. Fieraĉo.

Vertikale

1. Meze de la teren' de la virinoj.
2. Daŭra ago pretigi por sporta konkurso.
3. Esti necesa sen rilato al.
4. Aferisto en fortiga adverbo kaptis frukton, preterlasante tapiŝeton.
5. Senutila post lokpeta demando rilata al iu ukraina loĝantaro.

6. Insulo, kiu estas regula sesedro.
 7. Unuopa vitro.
 13. Specialistoj pri diaj aferoj, trinkaĵo kaj altiriloj.
 14. Mastro, aperas al si neatendita flankenŝoviĝo.
 15. Plej proksima punkto en planeda orbito.
 18. Elimin'.
 19. Fluso kaj malfluso.
 21. En la okazo, kiam, kun la supozo, ke, en la loko post la kvina.
- La solvo aperos ĵaŭdon. Samtempe ni prezentos novan krucvortenigmon.

Numero 4 - ĵaŭdo 24-a julio 1997

Infana ekspozicio

En la infana angulo de La Verda Kanguruo oni starigis internacian infanekspozicion. Temas pri la kunmeto de du ekspozicioj, kiuj dum la lastaj ses monatoj okazis en Kroatio. Al ambaŭ kontribuis pli ol 500 gelernantoj el 15 landoj de Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio.

La Aŭstraliaj infanoj (el la lernejo Carrum) ricevis etajn donacojn de la organizanto, kiu invitas ĉiujn kontribui al venonta ekspozicio pri popolkostumoj. Limdato: la 1-a de novembro. Adreso Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

Belartaj konkursoj de UEA

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 1997:

Poezio

- **1.** ne aljuĝita
- **2.** István Ertl (Nederlando) pro "Herbokanto"
- **3.** István Ertl pro "Pri fuŝpoemoj honteme pruntitaj"
- **hon. mencio:** István Ertl pro "Reportero silentas"

Partoprenis 38 verkoj de 17 aŭtoroj el 10 landoj.

Prozo

- **1.** Sabine Trenner (Germanio) pro "Pli ol nura lumo"
- **2.** Julia Sigmond (Rumanio) pro "Kiam mi pardonis al la kato?"
- **3.** Lena Karpunina (Germanio) pro "Jaŝa"
- **hon. mencio:** Stan Johansson (Svedio) pro "La naskiĝtaga donaco" kaj "Dufoja ekspono".

Partoprenis 21 verkoj de 12 aŭtoroj el 10 landoj.

Teatraĵo

- **1.** ne aljuĝita
- **2.** ne aljuĝita
- **3.** Vinko Oŝlak (Aŭstrio) pro "Ŝakludantoj (Diabla tragedio en tri aktoj)"

Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

Eseo

- **1. (Luigi Minnaja):** ne aljuĝita
- **2.** Vinko Oŝlak (Aŭstrio) pro "La homo serĉas sian imagon"
- **3.** Ignat Bociort (Rumanio) pro "La spirito de Esperanto kaj la samideanaj malamikaĵoj"

Partoprenis 5 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj.

Kanto

- **1.** ne aljuĝita
- **2.** Flavio Fonseca (Brazilo) pro "Misarujo"
- **3.** O. Semjonova kaj E. Ĥabarov (Rusio, respektive teksto kaj muziko) pro "Du semajnoj de l' feliĉo"

Partoprenis 6 kantoj de 6 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 5 landoj.

Premio Infanlibro de la Jaro 1996

- "Al la mondo donace", antologio de la serba porinfana poezio, elektita kaj tradukita de Zlatoje Martinov, eldonita de Strategia, Beogrado (Jugoslavio).

Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

Aŭstralia Futbalo

Videa programo okazos en ĉambro 8 je 12h00. Nia Adelajda futbal-teamo La Crows ludas.

La bankedo

Ĉe la bankedo 21-an de julio, Prezidanto Lee de UEA bonvenigis la partoprenantojn kaj petis al d-ro Ralph Harry proponi toston.

D-ro Harry diris, ke kvankam multaj pensas pri siaj hejmoj, pri neĉeestantaj amatoj, eĉ pri ŝtatestroj, en bankedo de la Universala Kongreso povas esti nur unu tosto: "Al Esperanto, nia movado kaj nia Komunumo !"

La ĉeestantoj stariĝis kaj ripetis la toston.

ILEI invitas

Se ĝis nun vi ne vizitis la ILEI-budon, nepre tion faru antaŭ la fino de UK. Ĉe la budo vi trovos interesajn informojn uzeblajn dum via E-instruado. Ĉi tie ni mencias nur informon pri Reto-klubo; novan kartludon; kaj manuskripton de la kurso "korespondo por infanoj" (aĝaj 6 ĝis 10), pri kiu vi estas petataj doni viajn

komentojn.

Ĉe la budo vi povos lasi ankaŭ viajn demandojn pri la problemoj, kiujn vi frontas dum la E-instruado.

Poŝto

Giĉeto en La Verda Kanguruo vendas poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj albumojn de aŭstraliaj poŝtmarkoj de 1996. Troviĝas leterkesto por leteroj kaj poŝtkartoj. Je 16h30, lundon ĝis vendredo, ĝi estas portita al la poŝtoŝticejo por ke oni aldonu la kongresan "stampon". Pakajon oni devas trakti en poŝtoŝticejo (la plej proksima estas en Bank St, ĉe la fino de la stacidoma subvojo).

Ni vendos diversajn poŝtkartojn de la Aŭstralia Poŝto, kies prezo, \$A1, inkluzivas flugpoŝton kien ajn (ne atentu la valoron de la presita poŝtmarko). La prezo estas do tre favora kompare al tiu de alispecaj poŝtkartoj. Cetere, tiuj de "Australia Post" havas verajn (ne simple presitajn) poŝtmarkojn.

Fakkunveno ĵurnalista

London, la 21-an TE-A (Tutmonda Esperantista ĵurnalista Asocio) okazigis kunvenon, kiun ĉeestis 10 personoj, el kiuj 6 estis membroj de TE-A.

Ĉar nur unu (la sekretario) el la estraro partoprenas tiun ĉi UK la kunveno ne povis esti oficiala, tiel neniu rezolucio eblis; sed tiuj, kiuj kolektiĝis, vigle diskutis pri diversaj temoj. Nemembroj esprimis intereson pri la asocio. Al ili la sekretario promesis sendi la broŝuron de TE-A kun aliĝilo.

Oni kontentis pri la raporto de la sekretario pri la rebonigo de la financa sano de la asocio, post la rezolucio pri aŭsteraĵ ŝparrimedoj. La ĉeestantoj tamen estis nekontentaj pri la manko de intereso pri ekstereŭropa UK fare inter la membroj.

Etnistoj kunvenis

En salono Ross okazis ĉi-lunde la jarkunveno de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), fakasocio, kiu intervenas en diversaj landoj de la mondo por defendi la rajtojn de la etnaj minoritatoj.

La vic-prezidanto de la Komitato, Daniele Vitali, prezentis prelegon pri "La graveco de lingvopolitiko kaj lingvoplanado por savi la minoritatajn lingvojn". Li montris kiel ĉe-tabla planado (kompreneble surbaze de surkampe konstateblaj lingvaj faktoj, kiel okazis por Esperanto) ludis gravan rolon en la evoluo de multego da nun oficialaj lingvoj, kiel la novhebrea, novnorvega, hodiaŭa irlandgaela, estona, rumana, suoma, belorusa, azerbajĝana, taĝika, kirgiza, kazaka, turkmena ktp. Krome, lingvoplanado havis influon sur la hodiaŭan aspekton de multe pli da lingvoj, ĉefe pere de ortografiaj reformoj: temas ĉi-foje pri la turka, somala, rumana, vjetnama, svahila, azerbajĝana, noĉa (aŭ ĉeĉena) ktp. Ĉio ĉi estis dirita por pruvi la gravecon de lingvoplanado en ĉiuj kampoj de la homa lingva komunikado.

La etnistoj refoje renkontiĝos por pridiskuti la problemojn de sia komitato. Oni atendas membrojn kaj nemembrojn ĵaŭdon, la 24-an, je la 17h30, en La Verda Kanguruo. Venu al la rendevua tabulo.

Skolta Esperanto-ligo

La kunveno estis neformala. Ĉeestis SEL reprezentantoj el Aŭstralio Jennifer Dimo; el Belgio Arie Bouman; el Nov-Zelando Gwenda Sutton; kaj unu skolto, Alan Kerr. Kelkaj interesatoj raportis, inkluzive de Amri Wandel, kiu parolis pri la situacio en sia lando. Jam oni planas grandan SEL-kunvenon en Montpellier. Tie oni montros la lumigitan panelon, kiu estis furore sukcesa en la monda ĵamboreo. La celo estas persvadi Esperantistojn instigi skoltojn, skoltestrojn kaj la naciajn skoltajn instancojn uzi Esperanton.

Piana koncerto

Okazos hodiaŭ en halo Lapenna la piana koncerto de itala pianisto Aldo Fiorentin. La recitalo komenciĝos je 16h30 kaj daŭros ĉirkaŭ horon kaj duonon (inkluzive de paŭzo de dek minutoj). Ĝi enhavos verkojn de F. Schubert (omaĝe al la 200-jariĝo de lia naskiĝo) kaj de F. Mendelssohn-Bartholdy kaj J. Brahms (memore al la 150-a kaj 100-a datrevenoj de iliaj forpasoj).

La programo konsistos el la jenaj komponaĵoj: Schubert (1797-1828), Sonato en Si-bemolo maĵora (postmorta eldonado); Mendelssohn-Bartholdy (1809-1847), 6 kantoj sen vortoj, op. 19; Brahms (1833-1897), 6 pianopecoj, op. 118.

Ŝtormido

Kaŝiĝema Tom, la patro de la ŝtormido Mike, fuĝis el urba vivo kaj loĝas en dometaĉo apud la izolita bestprotektejo Coorong. Tamen, la vivo de Mike baldaŭ ŝanĝiĝos...

Programŝanĝiĝo:

Ŝtormido videblos ĵaŭdon je 15h30 en salono Ross, kaj vendredon je la 14h30 en salono Williams (ĉambro 8). La filmo estas parto de la kulturo de la lando. "Ŝtormido" estas unu el la multaj sukcesoj de la Sud-Aŭstralio Filmkompanio.

Semajno de Internacia Amikeco (SIA)

Kiel revigligi SIA?

- La komisiito (ETA) instigas la E-grupojn al aktivaĵoj kun internacia enhavo en SIA.
- Dum jaroj tiu instigado kaj raportado devas esti daŭrigata.
- Necesas iom da fantazio por elpensi interesajn aktivaĵojn se la semajno estas tie vasta.
- Prefere oni faru simplajn programojn.
- SIA estu klare difinita: lasta plena semajno en februaro de lundo ĝis dimanĉo - sed oni povas, se necese, okazigi ĝin ankaŭ en aliaj periodoj.

Tago de la lernejo

La nur duonhoran programon, mardon posttagmeze, ĉeestis ĉirkaŭ 40 kongresanoj.

Enkonduke Atilio Orellana Rojas laŭtlegis artikolon verkitan de profesoro Duncan Charters, prezidanto de ILEI pri multkultureco kaj lingvolernado.

Post la teorio sekvis konkreta parto, raporto de s-ino Jennifer R. Bishop pri la nun disvolviĝanta Esperanto-projekto EKPAROLI, kies lulilo estas en Melburno. La ĉeestantoj mem havis okazon vidi kaj ĝui la rezulton de la tiea laboro: infana grupo de la elementa lernejo Carrum kantis kaj prezentis scenojn el la Mazi-filmo, sur kiu baziĝas ilia lernado de la internacia lingvo. Pri la nuna stato de Mazi-materialo kaj ties dissendado en la pola televido, raportis Roman Dobrzyński el Varsovio.

La aŭstralian eduksistemon kaj ties lingvopolitikon prezentis Alan Bishop, profesoro de Universitato Monash en Melburno.

Fine, la ĉeestantoj havis eblon ekkoni informojn pri alia instrufilmo, "Pasporto al la tuta mondo", kiu pretiĝas en San-Francisko. Lusi Harmon parolis pri la konceptoj de la aŭtoroj, la enhavo de la materialo kaj ĝisnunaj preparlaboroj, kaj vidigis la malnetan version de la kvar, jam filmitaj unuoj de tiu grandioza entrepreno. Ni deziras al ili multan sukceson kaj eĉ pli multe da mono por realigi la instrufilmon.

Pliajn informojn, kontaktadresojn kaj riĉan bibliografian liston pri la nuntempaj projekto celantaj prui la propedeŭtikan valoron de Esperanto, troveblas en la lasta numero de Internacia Pedagogia Revuo (2/1997). Informoj kaj flugfolioj pri la instruado kaj aktivado de la instruista ligo troveblas ĉe la ILEI-budo en La Verda Kanguruo.

Prof J.C Wells 21-an de julio 13-45 -

D-ro R.L Harry dankis al d-ron Wells. Li komentis, ke ĉiuj aŭstralianoj bedaŭras la malaperon de la tasmaniaj aborigenoj, kiujn preskaŭ tute mortigis la ĉeflandaj aborigenoj antaŭ la alveno de la eŭropanoj. Li diris, ke ekzistas simileco inter la aborigena diferencigo inter *ni* (*ci kaj mi*) kaj *ni* (*ni ĉiuj*).

Ankaŭ la aborigenoj multe uzas la universalan fenomenon "duobligoj" ekzemple Mita Mita, Wagga Wagga.

D-ro Harry notis, ke la eŭropanoj, kvankam ili altrudis multajn eŭropajn loknomojn, akceptis aborigenajn nomojn por multaj gravaj lokoj, ekzemple la federacia ĉefurbo Canberra, kiu signifas "Loko por Kunvenado".

Aliaj ekzemploj estas Geelong (kie d-ro Harry naskiĝis), Bendigo, Ballarat, Woolloomooloo, Narrabeen, Coolangatta.

Por kelkaj lokoj, al kiuj oni donis eŭropan nomon, oni revivigis la aborigenan nomon, ekzemple la grandega monolito de Centra Aŭstralio, "Uluru" (antaŭe Ayers Rock). D-ro Harry aldonis ŝerco, ke eble oni povus doni al Adelajdo la internacian nomon "Esperanto!"

Radio Esperanto

Marde antaŭtagmeze en la kongresejo okazis kunveno de radioaŭskultantoj kaj redaktoroj de elsendoj, sub la gvido de la komisiito de UEA pri radioaferoj, Andrzej Pettyn. Unue oni aŭdis raportojn de la redaktoroj de Aŭstria Radio Internacia, Ĉina Radio Internacia kaj Kuba Radio Internacia pri la aktuala stato de la E-elsendoj en tiuj radiostacioj. Pli poste venis ankaŭ informoj pri la stacio 3ZZZ en Melburno (Aŭstralio). Evidentiĝis ankoraŭfoje, ke en la eksterlandaj programoj de ŝtataj radiostacioj plue tre gravaj estas skribaj reagoj de aŭskultantoj, kiuj per siaj leteroj montras, ke la elsendoj estas aŭskultataj kaj sekve bezonataj.

Multe da atento oni dediĉis al la agado de AERA, kiu estas ekzemplo de fidinda liverado de aktualaj informoj pri radioelsendoj en Esperanto kaj meritas pli vastan subtenon. Ĝi estas modelo por diversaj organizaĵoj pri kreado de datum-bazoj konstante aktualigataj.

En la diskuto partoprenis radioaŭskultantoj, el inter kiuj la opinio de Rokuro Makabe estas aparte menciinda, nome, ke la aŭskultado de radioelsendoj en Esperanto donas al Esperantistoj ĉiutagan kontakton kun la vivanta lingvouzo kaj bonan informon pri la E-movado.

La Pekina kaj Varsovia radiostacioj elsendos en aŭgusto kaj pli poste amason da intervjuoj kaj raportoj pri kongresaj aferoj. Pola Radio ankoraŭ dum la kongresa semajno ĉiutage raportas pri kongresaj okazaĵoj, kio ebligas al eŭropanoj sekvi la evoluon de la kongresaj debatoj.

Dumprelege

Kongresano konsciiĝas dum kunsido: "Mi sentas min kvazaŭ mi estus en aviadilo; dum mi dormetas mi aŭdas la konstantan brueton, vekinte mi vidas ĉiam la samajn personojn, rigardante al la fenestro mi tute ne povas diveni, en kiu parto de la tago mi fakte estas."

Konsilo: Atentu, amiko, ni jam estas meze de la kongreso, la aviadilo flugas reen!

Internacia arta vespero

Se vi volas kontribui al la Internacia Arta Vespere, vi NEPRE devas kontakti la oficejon de la Artaj Aranĝoj en La Verda Kanguruo antaŭ 14h00 jaŭdon. La Internacia Arta Vespere okazos vendredon en halo Zamenhof, kie, pro la komplika naturo de la teknikaj aferoj, necesos provludi vendredon dum la tuta tago.

Distraĵoj

Vi povos ĝui hodiaŭ kelkajn bonegajn distraĵojn. En salono Lapenna je 14h00, fama aktorino Vida Jerman prezentos teatraĵon, "Inventante, ke mi sonĝas". En halo Zamenhof je 20h00 Magiisto Michael distros per sia mistera magia programo. Poste, en Zamenhof je 21h00, ĝuu la kabareton de kara f-ino Emily Barlaston.

Savu esperantaĵojn

Voko al ĉiuj arkivistoj, bibliotekistoj, katalogistoj, muzeistoj, kaj tiuj, kiuj kolektis aŭ kolektas historiaĵojn kaj valorajn esperantaĵojn:

Diskuto pri komenca laborplano okazos je 16h00 ĵaŭdon, 24-an de julio, en salono Privat (ĉambro 11). Ĝi estos malfermita al ĉiuj, kiuj havas intereson pri la konservado kaj prizorgo de esperantaĵoj mondvaste. La kunordiganto estas Vilĉjo Harmon (kn 297).

Pri la ILEI konferenco

La 31-a ILEI konferenco okazos en Avalon, apud Geelong, Viktorio, la 27-an de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Ĉiuj partoprenontoj bonvolu tuj sciigi ĉe ILEI-budo vian proponitan transportrimedon al Melburno kaj la horon kaj lokon de via alveno, por ke transporto al la konferencejo estu mendita.

La libro de la spiritoj

Okazis la 22-an resuma parolado pri la ĉefaj principoj de la spiritismo. Tiuj estas:

- senmorteco de la animoj
- konvinkobleco de la mondo pere de mediumoj
- reenkarriĝo kaj evoluo.

Sekvis respondoj al demandoj.

Salutvortoj

Se iu deziras kopion de la salutvortoj de la ĉefa ambasadoro, Jaroslav Suchanek ĉe la malfermo de UK, bonvolu peti ĝin ĉe la Gazetara Servo.

Krucvortenigmo

Horizontale

1. Per formala aserto apartenanta al distingeble.
5. Plankokovril'.
8. Objekt' prezentita al iu.
9. Kantistino de la unua rango koncerne al la jesupatrino.
10. En polemika praktiko rilata al kornhava mamulo.
12. Plivigligilo.
13. Tirane premegi, tio estas, kun nulo reprodukti.
15. Prenas kun si, celante trinkvazet'.

18. Per surskribo sur tomoŝtono.
19. Stacidoman trotuaron.
20. Pri fuŝa kompostado kaj pri la rilata fako altvalora ĉar malofta.
21. Senvalore.
22. Disĉiplaro.
23. Ago kontraŭstari.

Vertikale

1. Konkludo el konduktubo.
2. Akompanate de.
3. Reordigite, malglata restas malglata.
4. Kun preterlaso de nenecesaj vortoj.
5. En tiu tempo femala estaĵo prezentiĝas kiel vitamino.
6. Objektoj faritaj rezulte de kondukiloj.
7. Roketo.
11. Inklino mallojale endanĝerigi per inklino kalkuli je iu aŭ io.
14. Surpieda restejo.
16. Impresiĝemo manke de priparolataĵoj.
17. Ordigita diskuto pro subita malfeliĉo.
18. Skrape prilaboras.
19. En bukla volvaĵo videblas prembutono.
21. Rilata al kora inklino.

Numero 5 - vendredo 25-a julio 1997

Esperantistoj gastas ĉe aborigenoj

Merkredon la 23-an, dum la ekskursa tago, trideko da kongresanoj vizitis la aborigenan kolezion Taoundi en Port Adelaide. Tie studas aborigenoj ne nur el la ĉirkaŭaĵo de Adelajdo (kiuj estas de la etno ngaŭna) sed ankaŭ el aliaj ŝtatoj de Aŭstralio.

La interkonatiĝo pasis en tre malstreĉa etoso, dank' al muziko (ĉe la esperantista flanko gitaris Julián Hernández el Kubo) kaj al la amuza Cseh-metoda instruado de Katalin Smidéliusz. Sekvis vizito tra la kolegia konstruaĵo, lumbilda prezento de artverkoj fare de la kolegianoj, kaj klarigo pri la aborigenaj ilaro kaj vivmaniero. Grandan emfazon ricevis la nesufiĉe konata diverseco de aborigenaj kulturoj tra la kontinento, kiuj nombras pli ol 300. Bedaŭrinde malmultaj el ili povas rigardi al la estonteco kun certeco pri la sorto de siaj lingvo kaj kulturo.

La kvarhora vizito reciproke riĉigis la ĉeestintojn: kiel vortigis unu el la gastigintoj, la esperantistoj malfermis por la kolegianoj fenestron al la mondo, dum ĉi tiuj klerigis la unuajn pri siaj specifaj kulturoj, tiom pli proksimaj al la naturo ol estas tiuj de la plejparto el ni, urbanecaj geblankuloj.

Stultularo, idiotaro, malsaĝularo? Ne, jen junuloj !

La junularaj okazoj komenciĝis per konfuza kunveno dimanĉe, sed poste pliboniĝis. London ni ekskursis al Glenelg, kie ni manĝis bone (dankon, Nikola). Ĉiuj ĉe "Glenelg" rigardis kaj ridis pri iu stranga viro, kiu insistis naĝi en la ege malvarma akvo de la maro. Gratulon al la magiisto! Mardon grupo de junuloj iris al kinejo por spekti la amuzan filmon "Bean". Merkredon ni noktklubumis kaj ĵaŭdon drinkejumis.

Artikoloj, kiuj aperis en landaj ĵurnaloj

Se vi deziras havi kopion de la artikoloj, kiuj aperis en diversaj gazetoj dum la semajno, bonvolu veni al la gazetaro servo, ĉambro 6.

Cseh-kurso kaj seminario

La tradiciajn aranĝojn de IEI ankaŭ ĉi-foje partoprenis multaj kongresanoj. Dum la seminaria laboro 8 personoj (el 8 diversaj landoj kaj 4 kontinentoj) studis la faman metodon kaj observis la paralele okazigitan lingvokurson por komencantoj. Tiun lastan regule frekventis ĉ. 15 lernantoj, sed pliaj 25 venis nur por unu aŭ du tagoj. La aranĝoj havis sukceson, la lernantoj lernis multe en amuza maniero kaj espereble ricevis grandan puŝon por la plua lernado de la lingvo. Vendredon posttagmeze okazos la prov-instruadoj de la seminariaj kandidatoj, kiuj en 5-minutaj prezentadoj pruvos al la gvidantino, Katalin Smidéliusz, ke ili komprenis la esencon de la

metodo, eĉ kapablas apliki kelkajn el inter ties bazaj teknikeroj. La organizantoj esperas, ke ĉiu kandidato daŭrigos sian studon kaj aliĝos al la sekva ŝtupo (grado B) de la formado de Cseh-metodaj instruistoj.

Interlingvistikaj studoj komenciĝos en Pollando

La Universitato de Adam Mickiewicz anoncas 3-jaran eksteran studadon pri interlingvistiko. La unua studjaro komenciĝos en la vintra semestro de 1997/98, kaj poste ĉiun trian jaron. La internacia kurso okazos en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-ino Ilona Koutny.

La interlingvistikaj studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko kaj el internacia kaj interkultura komunikado. Ili traktos planlingvojn kaj detale okupiĝos pri la gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi ankaŭ pri metodiko.

Surloka kurso okazos unufoje dum la semestro (lastan semajnon de aŭgusto kaj de januaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos Atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Kotizo por unu semestro: US\$ 400 (nepagpovaj landoj US\$ 80). Postulo: fino de mezgrada lernejo kaj bona scio de Esperanto.

Por pluaj informoj kaj aliĝilo kontaktu d-inon I. Koutny: Lingvistika Instituto de Universitato de Adam Mickiewicz, ul. Miedzzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznan. Tel: +48-61 618-572 (sekretariejo). KAO ĉe ILEI-budo.

Internacia arta vespero

Nepre estu en salono Zamenhof ĉi-vespere por vidi imponan prezentaĵon, kiu komenciĝos je 20h00.

Perditaj okulvitroj

Post ekskurso merkredon, la 23-an, mi forgesis miajn okulvitrojn en la malgranda buso, en la reto de la lasta vico. Se vi trovis ilin, bonvolu doni al la informejo. H. Muhsal [kn 80].

Laborgrupo

Mardon posttagmeze okazis laborgrupa kunsido pri informado. Ĉeestis proksimume 12 homoj kaj gvidis la kunvenon Michela Lipari. Oni klarigis tie, ke malgraŭ la manko de la estrarano pri informado, nun ekzistas anstataŭe komisiito, kiu jam preparis laborplanon. Sekvis iom nekohera diskutado dum unu horo kaj duono, en kiu oni tamen aŭdis interesajn novaĵojn kaj proponojn. Ŝajne la ĉefa decido de la laborgrupo estis rekomendi, ke oni okazigu apartan sesion en la venonta UK por "aktivula trejnado", kie oni povos interŝanĝi informojn pri propagandiloj kaj propagandmanieroj.

Karaj LKK-anoj

Preskaŭ la tuta Manlia Klubo ĉeestas kaj ni volas diri, ke ni ĉiuj ege ĝuis la kongreson ĝis nun kaj ni volas gratuli vin ĉiujn pro la granda sukceso.

R.G. Robertson (Prez), M.D. Robertson (Kasistino), E. Graham (Vic Prez), J. McClelland (Socia Komitato).

La teatraĵo "Zamenhof"

La teatraĵo de S-ino Jadwiga Gibczynska estis vere kortuŝa prezentaĵo. Ŝia emociiga talento kaj klara voĉo pli briligis la prezenton. Spektante la teatraĵon, mi sentis tiel, ke mi kvazaŭ legus la biografion de Zamenhof, verkita de Edmond Privat. Rondvojaĝante tra la mondo, ŝi povus prezenti sian talenton, kio multe helpus nian movadon. Plie, se estus vidbendo de ŝia prezentado, mi estus pli kontenta kaj ĝoja. Ankoraŭfoje mi kore dankas kaj sincere salutas al kara samideano, S-ino Jadwiga Gibczynska.

Radio Aŭstria

Vi interesiĝus pri la aktuala kaj varia programo de Radio Aŭstria Internacia en Esperanto, sed eble nun vi ne povas ties disaŭdigon kapti, ĉar via loĝloko aŭ lando apartenas ne al tiuj, kie ĝi aŭdeblas.

Jen nia propono: Skribu petleteron en via nacia lingvo al la ambasadoro de Aŭstrio en via lando, menciante en ĝi, ke per jena Esperanto programo vi havus eblon ekkoni Aŭstrion kaj ties kulturon, sen kompreni la germanan. Fine nepre petu, ke oni informu vin pri tio, kion oni faris rilate vian peton!

Se vi rapide agas, estas granda la ŝanco, ke dum la sekvonta vintra periodo vi jam povos aŭskulti la disaŭdigojn de Radio Aŭstria Internacia en Esperanto!

Dezirante baldaŭan aŭskultadon, salutas vin la teamo de la Esperanto Redakcio de ORF-RAI!

Dankon

La redakcio de La Lumilo kore dankas la kongresanojn pro iliaj kontribuoj (ĉu ni trovis spacon por ili, ĉu ne) kaj pro ilia indulgo pri eraretoj, kaj deziras al ĉiuj feliĉan vojaĝon hejmen kaj baldaŭan renkontiĝon.

Ŝtormido

"Ŝtormido" refoje videblos, en ĉambro 8 je la 14h30. Ĝi daŭras 90 minutojn. Bedaŭrinde pro kopirajtaj kialoj ni ne rajtos vendi kopiojn, sed ni donacos kelkajn al la ĉefaj bibliotekoj en Esperanto.

Aŭstralia piedpilko

Video programo okazos en ĉambro 8 je la 12h00. Nia Adelajda futbal-teamo La

Crows ludas.

Timor - la infero ĉi-apude

Dimanĉon la 20-an, en salono Hodler, prezentis prelegon Miguel Faria de Bastos, advokato kaj prezidanto de la Portugala Esperanto-Asocio. La temo estis "Okupacio kaj aneksado de la kolonio "Orienta Timoro" fare de Indonezio, kaj kompliceo de Aŭstralio". La prelego okazis ene de serio da prelegoj (20-an ĝis 25-an) sub la kongresa temo, "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo".

Orienta Timoro estis priskribita kiel "kvazaŭa laboratorio de ŝtata malrespekto kontraŭ ĉiuspecaj homaj rajtoj". Inter la aŭdantaro ne okazis reagoj kontraŭaj.

Pri la Marsa spacmisio

Ĉu vi interesiĝas pri la lastaj novaĵoj el la spac-flugo al la planedo Marso? Mallongan prezentaĵon pri tiu temo faros prof. Wandel hodiaŭ je la 10h00 horo en ĉambro 8.

Pasporto al la Tuta Mondo

Video-kurso por instrui Esperanton prezentiĝos vendredon je la 16h30 en ĉambro 8. Bonvolu veni.

Vidbendoj

"Al Sud-Aŭstralio", 30-minuta vidbendo pri la ekskurso-lokoj aĉetebblas (VHS-PAL kaj NTSC) en la libroservo, kontraŭ \$15. Jennifer Bishop parolas, Margaret Furness filmis. Aŭdeblas diversaj birdkantoj.

Arboplantado

Tio okazis per laboro de diverslandaj samideanoj. La nomŝildo ankoraŭ ne alvenis (la vivo enhavas multajn tiajn misterojn), sed ĝi diros, ke la kongreso donacis la arbon al Adelajdo. "Paco kaj Amikeco". Nun estas 5 Esperanto-arboj en la parkoj. Ĉiuj estas ginkoj.

UEA kaj SAT

Ĉeestis 36 personoj, el kiuj 14 estis SAT-membroj. Prezidis Ledon, kiu unue legis la mesaĝojn de la Prezidanto de la Plenumkomitato, Yves Peyrant, kaj de la ĝenerala sekretario Kreŝimir Barkoviĉ. Yamasaki klarigis la fonon de tiu ĉi historia evento de SAT-kunveno kadre de la UK. Pro manko de tempo, oni ne povis diskuti detale; interalie, Ledon, Kep Enderby, prezidanto de LKK, kaj Osmo Buller, ĝen. sekretario de UEA gratulis la amikiĝon de la du mondskalaj Esperantaj organizaĵoj.

83-a UK Montpellier

Se vi aliĝas ĉi-tie, jen la kotizoj en aŭstraliaj dolaroj.

1. ne individua membro de UEA: \$190, \$144*
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas membrojn kun gvidlibro): \$153, \$116*
3. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA: \$116, \$87*
4. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, individua membro de UEA: \$76, \$58*

* Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

Esperanto-klaso

En la venonta aprilo komenciĝos Esperanto-klaso en supera mezlernejo en Yokohama, Japanio. Estos la unua fojo, ke oni instruas Esperanton kiel oficialan lerno-objekton en tia lernejo en Japanio. Estas esperate, ke junaj esperantistoj sendos leterojn aŭ kartojn venontjare al Nippa Kôkô, 1348 Nippa-chô, Kôhoku-ku, Yokohama, 223 Japanio.

Plia argumento por lernado de Esperanto

Evidente ĉiu homo, kiu scias nur sian nacian lingvon, spertas grandajn problemojn en internacia komunikado. Tiu fakto estas vaste konata kaj estas unu el niaj oftaj argumentoj por lernado de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj. Tamen alia atentenda punkto estas la ĝenerale malavantaĝa pozicio de unulingvulo - ne nur rilate interkompreniĝon internacian, sed eĉ ene de la propra lando. En ĉiu lando de la mondo ja loĝas ne nur la tie naskiĝintaj homoj sed krome enmigrintoj. Ili kunportas - kvazaŭ kiel naturan "donacon" - sian propran lingvon, kiun ili scias denaske. Aldone ili lernas la lingvon de sia nova loĝlando. Tiel ĉiu enmigrinto estas minimume dulingva kaj rilate al komunikado trovas sin en situacio pli favora ol la unulingva nacilingvano. Eĉ se tiu lasta lernis duan, alinacian lingvon en la lernejo, li kutime regas ĝin ne sufiĉe pro manko de praktiko en la ĉiutaga vivo. Tial li ĉiam restos en malavantaĝa situacio.

Enkonduko de Esperanto kiel aŭ aldona aŭ eĉ ĉefa fremdlingvo en ĉiu lernejo ĉiulande havigus pli egalecan situacion al ĉiuj. Ĝi krome mildigus la malavantaĝon, kiun unulingvano spertas en sia propra lando kompare al lingve pli lertaj, plurlingvaj enmigrintoj. (Tiu punkto ŝajnas esti interesa, precipe rilate al anglalingvaj landoj, kies loĝantoj ofte malemas lerni fremdajn lingvojn pro erara kredo, ke ĉie estas parolata la angla).

Intima teatro

Rolludos por ni hodiaŭ Jadwiga Gibczynska, kiu prezentos miniaturan teatraĵon pri tiklaj homaj temoj.

Ĝi okazos en Linton, kunvenejo 5, je 17h00.

Mesaĝo de Ipswich

Mardon vespere, antaŭ ol komenciĝis la koncerto, prezentita de la LKGT-kvarteto el Ipswich, Kvinslando, la kongresanoj aŭdis mesaĝon de la estro de tiu urbo, Sro John Nugent. La urbestro deklaris la deziron de sia magistrato subteni Esperanton kaj kuraĝigi ĝian uzon en la urbo. Li laŭdis la laboron de Karakàn Kochàrdu, kaj per instruado de la lingvo al lernejoj, kaj per ĝia konatigo al la ĝenerala komunumo. Li invitis la kongresanojn partopreni en la somerkursaro okazonta en Ipswich en januaro 1997.

La Akademio

Reprezentis la Akademion en publika kunveno je 10h00, ĵaŭdon, S-ro Yamasaki, S-ro Pettyn, Prof. Wells, Prof. Kiselman, Prof. Wandel.

Yamasaki resumis la laboron de la Akademio. Kiselman menciis sian laboron en la kampoj de matematiko kaj gramatiko. Pettyn parolis pri la problemoj de redakcio kaj rapida lingva kontrolo kaj notis la mankon de eraro-bulteno. John Wells parolis pri la neceso de singardemo pri lingvo-uzo. Li citis kelkajn ekzemplojn, tiujn de la uzo de la malĝusta "plastiko" anstataŭ la ĝusta "plasto" kaj de la malĝusta "tipika" anstataŭ "tipa". Wandel notis la bezonon por iu fajro-brigado, reagi ĝustatempe.

Oni notis, ke baldaŭ aperos hejma vortaro por Esperantaj familioj. Menciita estas la bezono de geografia terminara laboro. Oni menciis ankaŭ la novan komputilan leksikonon, haveblan ĉe la Libroservo. John Wells diris, ke la Akademio ne havis reagon al kompilita radikaro.

Kunvenaj sonbendoj

Se vi deziras aĉeti kopion de la sonkasedoj faritaj dum la diversaj fakaj kaj aliaj kunvenoj, nepre mendu hodiaŭ (vendredon) ĉe la ĝiĉeto en La Verda Kanguruo. Tion farinte, vi povos preni la kasedojn sabaton matene.

Fervojista kontaktkunveno

Mardon la 2-an de julio okazis kunveno de fervojistoj. Partoprenis dudek personoj el naŭ landoj. Ili ricevis informon pri la historio de IFEF kaj raporton pri la 49-a kongreso, okazinta en la urbo Košice (Slovakio) en majo 1997. Sekvis fakprelego de d-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA, pri la temo, "Sanon por ĉiuj ĝis 2000". La ĉeestantoj vigle diskutis pri la venonta jubilea IFEF-kongreso, okazonta en Aalborg (Danio), pri plurlingvaj fervojfakaj terminaroj, kaj pri la taskoj rilate al "kampanjo 2000". Novaĵo estis, ke IFEF kaj UMEA volas kunlaboron en tiu kampanjo, por preventi la kronikajn malsanojn de fervojistoj.

Lastatempaj aliĝantoj

1187 F-ino K. Sills, 9 Ballantyne Street Thebarton SA

1188 Suzanne Palmer-Holton, PO Box 85 Seaford VIC 3198

1189 pwel-q Peter Ellyard, PO Box 12843 PO A-beckett Street Melbourne VIC 3000

1190 Zbigniew Wybraniec, 10 Shepley Crescent Burton SA 5110

1191 Frauke Elber, 213 Anne Burras La Newport News VA USA

1192 Ross Patrick Linnane, 28 Redford Street Vale Park SA 5081

1193 Zoe Clare Linnane, 28 Redford Street Vale Park SA 5081

1194 Hugh Gregory Linnane, 28 Redford Street Vale Park SA 5081

1195 Sid Grant, 2 Cranston Street Port Lincoln SA 5606

1196 Ookubo Rjo

1197 aheth-j A¶tar Etemadi, Bahar Shomali Kuche Aghamo Hmmadi Tagage Sevom, Nr. 25 Tehran 15747

1198 Rpri-r Raymonde Perault, 7 Rue Du Pont National 77250 Moret S/Loing FR

1199 Karakan Kochárdy Lot 10, Suffield Drive, Yamanto QLD

1200 Kerrie Smith, 15 Camroc Ave, Tranmere SA 5073

1201 Emese Kochárdy, 33 Suffield Drive Yamanto QLD

1202 Galina Sliwa, 6/117 Old Perth Road WA, Bassendean 6054

1203 Romano Bolognesi, Via Misa 4, IT-40139 Bologna, Italio

1204 Elisa Gualandi, Via Misa 4, IT-40139 Bologna, Italio

1205 Gianfranko Tomba, via Marco Polo No 21/28 40131 Bologna Italio

1206 Gustavo Gualandi, Viale Della Resistenza 51, 40065 Pianoro Bologna Italio

1207 smns-f Sandor Monostori, PO Box 125 Toorak VIC 3142

1208 Mukunda Raj Pathik Wagle, Campus of International Languages, Exhibition Road, Kathmandu Nepalo

1209 effs-i Belen Fontecha Soto, CCDr JJ Domine, G. 18o Valencio Hispanio

1210 effsi Johano Fontecha Soto, Belen Fontecha Soto, CCDr JJ Domine, G. 18o Valencio Hispanio

1211 Jean-Guy Richard, 3470 Durocher #401, Montreal, Quebec, Canada, H2X 2E1

1213 Jeremy Bass, 3470 Durocher #401, Montreal, Quebec, Canada, H2X 2E1

1214 nsob-a Maria Antonia Dos Santos Nogueiri Sobral, TR. Das Pombas, 17- Caixa Postal 173 Mairipora-SP-Brasil-07600-970

1215 Cecilia Nogueira Calmon Sobral, TR. Das Pombas, 17- Caixa Postal 173 Mairipora-SP-Brasil-07600-970

1216 gumd-g Doroti Guiro Marino, R. Anastacio De Souza Pinto, 297-APTO92-Freguesia Do o-Brasil-Sao Paulo_Cepo 2926_030

1217 Alyda G. Wilson, 9 Nightingale Street Yarram VIC 3971

1218 Harry A. Wilson, 9 Nightingale Street Yarram VIC 3971

1219 Keiko Shiraya Nagi, T420 No 12-30, Yoichi 3 chome Shizuoka Japanio

1220 Alda Gomes, R. Gabriel Dos Santos 388_apto 123 _ Higieno Polis _ Saopaulo Brazilo

1221 Masata Wada, 4-14-25, Jujimi Higashimurayama, Tokio Japanio

1222 Debra Zapata, 154 Matlock Street, Mt Hawthorn, WA 6016

1223 Giovanna Martino, Contrada Barchi 20 Terracina LT

1224 A. Manley 67 Cobran Street, Cheltenham NSW 2119, Aũstralio